Moskvo
28-IV-26.

Estimata Sinjoro!

Hodiaŭ mi sendis al vi — leteron per posto rekomendita, en kiu mi dankis pri la literaturo ricevita, sed N 1 de Api ankoraŭ ne venis.

Jus mi ricevis 5 N-ojn de Api N 1. Koran dankon

Nur unu rimarko estas necesa

Mi ne diras (pag. 93) ke la libro „Ponto" estis eldonita en Ido. — Tute kontraŭe — „la libro ne aperis malgree la subvencio de prof. Ostwald!"

Mi estas joja, ke mi povas al vi sendi ankoraŭ kelkajn ekzemplerojn de mia libro por distribuo inter la akademianoj, sed bedaŭrinde la libro (3000 ekz.) estas elcerpita. Malfacile kaj hazarde mi trovas ian ekzempleron ĉe iu libristo.

Esperebl baldaŭ aperos nova eldono.

Mi petas laŭeble sendi al mi, krom la libroj pri kiuj mi jam skribis hodiaŭ matene, ankoraŭ tiujn novajn, kiujn mi trovis en N 1 de Api (rig 3 p.)

Samtempe mi petas s-ron Lerchner — en Leipzig sendi al vi por mia konto 7½ usonaj dolaroj. La sumo plie bezona estos

2)

sendita senprokraste post ricevo de fakturo

Sur p 3 mi notis mankantajn ekzemplerojn de Discussiones K.a.

Ĉle vi povas antaŭ ĉiu liveri al mi.

Kiel vi vidas por la jaroj 1909-13 plenajn kolektojn mi ne bezonas.

Kun saluto mondlingva

via E Drezen

P.S. Ĉu vi havas intereson por la sovetia Esperanto-movado. Mi povas zorgi ke vi ricevu nian dumonatan gazeton „Internacia Lingvo".

SEU (Sovetl. Esp. Unio) havas jam proksimume 10000 membrojn kaj presas sian gazeton en 4500 ekzempleroj.

La kampo por I.L. estos ĉe ni baldaŭ tre bona.

Pri mi mem – mi estas ŝtata oficisto kaj krome mi estas profesoro*) en la „Instituto de Nacia Ekonomio de Plehanov" en Moskvo

E D.

*) pri la „organiz kaj administr-scienco".

3

Libroj dezirataj.

1) Canesi – identificatione de lineas de ferrovia ——

2) Panetianco – De Adamante —— 0

3) — " — Lege de Haüy, et lege de Symmetria ——

4) Peano operationes super magnitudines ——

5) Definitione de numeros irrationale ——

~~6) Burali – Relatione inter medio arithmetico et geometrico~~

6) Stamm – Connexione inter operationes arithmetica et logica ——

———

4)

Discussiones 1909-1910 N 5 —
1911 NN 3–5 —
1912 NN 6–7 —
1913 NN 1–3 —
} aliajn NN-ojn mi havas.

Circulares a. 1921 –, 1922 – 1923 – 1924 –

a 1925 NN 1–2 (ne ricevitaj)

Spedito tutto, meno 0, il 7. VI. 1926